



# PENSEO

N-ro 167

Sept./2005

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro <http://www.elperno.net/penseo.htm>

## Plenan Sukceson al la 6-a Ĉina Kongreso de Esperanto!

Li Sen

### Gratulon al la 6-a ĈKE

*laŭ melodio Belulino Yu*

Tridek jarojn estimas mi ĈEL-n,  
Krepusko ankaŭ buntas,  
Promenas mi en la vesperon.  
Landaj kongresoj ĉiam ja abundas.

Dezir' oldula restas,  
Mi l' ĵuron ne forgasas.  
Oferas mi la vivon per la manoj,  
Antaŭenmarŝas kun samideanoj.  
2005-08 Huhehot



Guozhu

### Gratulon al la 6-a ĈKE

— *Eĥe al la poemo de Li Sen laŭ melodio  
Belulino Yu*

En dudek jaroj ses kongresoj,  
ĉiuj kun sukcesoj.  
En starigo de harmonia socio  
progresu Esp-a Movado de Ĉinio.

Ankoraŭ viglas batala fervoro.  
Neniom ŝanĝiĝis Verda Koro.

Jen venas homoj junaj post nejunaj,  
antaŭen marŝas en luktoj komunaj!  
2005-09-09 Quanzhou



Guozhu

SALUTE AL TAN XIUZHU  
kiu bone servis kiel prezidanto de  
ĈEL dum 1995-2005

Tan Xiuzhu devis iĝi malgraŭvole  
la kvina prezidanto de ĈEL.  
Tre malfacila tasko, alta celo.  
Dum brilas antaŭul' tro auxreole.

Ni maltrankvilis por vi senkonsole.  
Tamen laboras vi kiel modelo,  
kaj Tan eĉ devis iĝi malgraŭvole  
la sesa prezidanto de ĈEL.

Ambaŭ mandatojn vi plenumis sole  
per pacienc', sincero kaj fidelo.  
Vi konsekvence iĝas verda stelo.  
Mil dankojn! Ni aklamas vin sangbole.

Tan Xiuzhu, heroinu malgraŭvole!



## El Libro de Poezio

### Kverantaj pandionoj

*\*Junulo enamiĝas al knabino, kiu kolektas braseniojn.*

Sur rivera et-insulo  
 Kveras paro pandiona.  
 Enamiĝas ĉi-junulo  
 Al knabino bela, bona.  
 Longaj, kurtaj brasenioj<sup>1</sup>  
 Kreskas, svelte ŝi elŝiras.  
 Pri l' knabino iluzioj  
 Eĉ tagnokte en li giras.  
 Al ŝi korinklinas vane,  
 Li tagnokte en am-revo.  
 Kaj senĉese pasi-flame  
 Lin turmentas sopirdevo.  
 Longaj, kurtaj brasenioj  
 De ŝi lerte amasiĝas.  
 Fiancin' en lir-arioj  
 La knabino ja fariĝas.  
 Longaj, kurtaj brasenioj  
 Selektiĝas delikate.  
 Ŝin ĝojigas simfonioj  
 Tamburade kaj tintade.  
 1) brasenio – (brasenia) manĝebla sovaĝa  
 planto kreskanta en aŭ ĉe akvo.



### Visterioj

*\*Virino edziniĝinta deziras viziti siajn gepatrojn dum trilado de flavaj birdoj.*  
 Tiuj longaj vistorioj<sup>1</sup>  
 Rampe zigzagas envale,  
 Densas verdaj la folioj.  
 Flavaj birdoj flugas are,  
 Kaj sidiĝas sur arbedoj

Kun rukulaj triloĵetoj.  
 Tiuj longaj vistorioj  
 Rampe zigzagas en valo  
 Kun prosperaj folioj.  
 Oni por ŝtofa elfaro  
 Ilin falĉas kaj kuiras,  
 Vestojn komfortajn akiras.  
 “Vartistin’, al familio  
 mi revenos en ferio.  
 Mian kamizolon trovas,  
 Kaj ĉemizon. Nun jam spite,  
 Kiujn lavis aŭ ne, povas  
 Al gepatroj mi vizite!”  
 1) visterio – (Visteria) volve grimpanta  
 arbedo, vd. en PIV.



### Ksantioj

*\*Virino sopiras al sia edzo iranta foren. (La lastaj tri strofoj versas laŭ imago de la edzino pri la edzo sur vojo).*  
 (Virino:)  
 Pluko de ksantioj iras,<sup>1</sup>  
 Kordo restas nur ne plena.  
 Al la edzo mi sopiras,  
 Metu ĝin ĉe voj’ bona.  
 (Edzo en ŝia konjekto:)  
 Grimpas nun mi sur monteto,  
 Krure tremas la ĉevalo.  
 For sopiro por kvieto,  
 Pleniĝu l’ ora pokalo.  
 Sur altaj’ pli la ĉevalo  
 Grimpas kun rigard’ malklara.  
 Pleniĝu l’ korna pokalo,  
 For sopiro pri la kara.  
 Grimpas sur rokpint’ grimace,  
 Ŝanceliĝas la servisto,  
 Mi kaj la ĉevalo lace,

Kion fari? Ho ve, tristo!

1) ksantio – (Xanthum) monoikaj herboj. vd. en PIV.

esperantigis **Sceto**

## Originalaĵoj

# Bela Ŝoforino

### Minosun

En mezbuso sur montara vojo tri kanajloj tenantaj pafilojn okulsekvis belan ŝoforinon kaj trudis al ŝi haltigon de la mezbuso. Ili elbusigis ŝin intencante seksatenci ŝin. Okaze de tiu danĝero, la ŝoforino alvokis savhelpon, sed la tuta mezbuso da pasaĝeroj silentis kiel aŭtuna cikado. Nur unu marasma mezaĝulo heroe leviĝis, sed li estis tuj batfalita surplanken. La viro koleregis kaj laŭte alvokis, ke la pasaĝeroj bridu la perforton, sed nenia reago okazis. La ŝoforino estis trenita en arbaron. Post duona horo, la tri kanajloj kaj la ŝoforino en transformaj vestoj revenis. Stironte, la ŝoforino postulis, ke elbusiĝu la malgrasa mezaĝulo ankoraŭ sanganta. La viro obstine sin tenis en neado. “Vei, vi elbusiĝu, mi ne veturigas vin.” La mezaĝulo urĝis, dirante: “Mi deziras savi vin, ĉu tio estas erara? Vi estas sendankema?” “Savu min? Je kio vi savis min?” La absoluta nego de la ŝoforino provokis ŝtelridon de kelkaj pasaĝeroj. La viro furioziĝis kaj riproĉis sin ne havi forton de giganto. Kvankam mi ne sukcesis savi ŝin, tamen el tio ne rezultigis, ke mi peliĝus el la buso. Plie, mi jam aĉetis busobileton kaj havas rajton sidi en la buso. La ŝoforino senkompatate persistis, ke se li ne elbusiĝos, ŝi ne ekstiros. Neatendite, la tutaj veturantoj, kiuj ĵus nenion rigardis la perforton, nun kvazaŭ elvekiĝinte, unuanime persvadis la viron elbusiĝi. “Rapidu elbusiĝi do. Ni havas urĝan aferon senprokrastan...” Kelkaj fortaj el la pasaĝeroj eĉ memvole paŝis al li peli lin. La tri kanajloj kontente ridis kun larĝiĝanta buŝo. Unu el

fiuloj senhontinde diris: “Ni kontentigis ŝin per seksumo.” La aliaj du sensencaĵe komentis, “Ŝi estas mia amatino, nenia rilato al vi.” Post la disputado, la vojaĝopakaĵoj de la viro estis forĵetitaj el la buso kaj li mem ankaŭ elbusigita.

La mezbuso denove stabile veturis sur la montara vojo. La ŝoforino aranĝis sian hararon kaj ŝaltis la radion. La vizaĝo de la ŝoforino aspektis eksterordinare trankvila; la paro da ŝiaj manoj firme tenis la stirilon; el ŝiaj okuloj fluis brilantaj larmoj. Unu el la fiuloj ŝajnis antaŭsenti ion, dirante: “Malrapidu, malrapidu! Kion vi volas?” La ŝoforino silentis sen respondo; la mezbuso pli kaj pli rapidiĝis. La kanajloj intencis preni la stirilon, tamen la buso jam impetiĝis en la krutvalon...

En la sekvanta tago, la loka ĵurnalo raportis: “Unu mezbuso kraŝis en krutvalo. Ŝoforino kaj dek tri pasaĝeroj en la mezbuso, neniu el ili postvivis la akcidenton.”

La mezaĝulo, kiu survoje estis pelita el la mezbuso, leginte la ĵurnalon, ploris. Neniu sciis, je kio kaj pro kio li ploris.

## Ravema Fiŝkaptisto

### Wei Yubin

En la frua tempo, ĉe la granda lago estis vilaĝo. Anstataŭ terkultivado, la vilaĝanoj sin vivtenis nur per fiŝkaptado. Por plenigi la ventron de si mem kaj de la familianoj, ili devis labori de frua mateno ĝis malfrua vespero sur la lago. la fiŝrikolton ili disponis duone por manĝi, duone por vendi. La vivo estis ne riĉa kaj ankaŭ ne povra.

Estis juna fraŭlo mallaborema sed fantaziema. Li opinis, ke la diligentaj fiŝistoj estas malsaĝegaj, kaj ke ili nur scipovis uzi sian forton sed ne sian saĝecon. Li ne volis esti tia, li do restis senfare en hejmo por elpensi genian metodon, per kiu oni povas riĉiĝi ĉe nur unufoja laboro.

En iu nokto, li sonĝis, ke maljunulino

